

Internacia Esperanto-Arkivo

Celo statuta

La asocio **celas**: kolekti, arkivi, protekti, administri kaj fari alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn kaj objektojn en kaj pri Esperanto kaj planlingvoj, maksimume en sia originala formo (apud diĝitaj kopioj).

Tiu ĉi arkivo celas konservadon kiel **heredaĵo**, por nelimigita tempodaŭro.

Aktivado

IEspA ne nur arkivas.

Ĝi volas organizi kursojn pri kaj aranĝojn por Esperanto.

Ĝi agadas por proklamigi “paroli Esperanton” nemateria heredaĵo en Flandrio kaj kunlabore kun aliaj iam tutmonde.

Ĝi kunlaboras pri monda komuna katalogo. Ktp.



Arkivejo

La nova arkivejon IEspA aĉetis komence de aŭgusto 2024 kaj enordigos samjare.

Ekde 2025 ĉiuj volontuloj kaj esplorantoj bonvenas. Adreso:

Hasseltsestraat 26,
3290 Diest
Belgio



situanta en Belgio, celanta tutmondon kolekton

Subteno al IEspA

Roza, lazura, ora aŭ eĉ ebura **Amiko** de IEspA ricevas personan brikon. Eblas akiri aldonajn brikojn por konstrui muron en via juvelŝranko. **Mecenato** helpas repagi la arkivejan prunton. **Volontulo** ebligas la katalogadon, longdaŭran konservadon kaj disponigon al esplorantoj.



IEspA


Fondita 25 januaron 2021, kuniga posteulo de la Fondaĵo Cesar Vanbiervliet en Kortrijk kaj de la privata kolekto de Marc Vanden Bempt en Loveno. Ambaŭ kolektoj tiel ricevis firman juran fundon.

La kolekto **kreskadas** per transprenado de personaj kaj asociaj kolektoj: Jean Dietrich, Lovena Esperanto-Asocio, La Hirundo Tienen, Edward Symoens, Petro De Smedt, Herman Deceuninck, kaj aliaj. Ĉu ankaŭ via?




Internacia Esperanto-Arkivo vzw
Hasseltsestraat 26, 3290 Diest
www.iespa.eu
info@iespa.eu

IEspA (asocio BE 0761.967.959)
IBAN: BE06 7310 5180 2722



Internacia Esperanto-Arkivo



Internacia Esperanto-Arkivo